# TEA-BULTENO

18A JARO — JANUARO - FEBRUARO 2015 — NUMEROJ 1-2


Kleriĝo estas laŭgrada malkovro de propra malsciado.
*William Durant (usona entreprenisto, 1861-1947).*

## Karaj Geamikoj!

Tutunue elkorajn bondezirojn de Bona Nova Jaro:
Sanon, Feliĉon, Pacon kaj Amikecon
ĝi malavare disdonadu al ni ĉiuj!

Alia jaro komenciĝis: ni rigardu al la ontaj tagoj, starantaj antaŭ ni, kun espero kaj fido je pliboniĝo de la tutmonda situacio, ĉiukampa, por antaŭmeti al la venontaj generacioj mondon vivindan kaj viveblan, kaj ni ne persistu en ties ade konstanta detruo kiu povus konduki la tutan homaron al katastrofo, ne plu riparebla (ĉu eble jam tia?).

Oni ja ne devas pensi egoisme nur pri si mem, ĉar finfine la homa vivo daŭras nur kelkajn jarojn, kaj tio kion oni faras en tiel malmulte da tempo povas kaŭzi la kolapson de la tuta mondsistemo. Fine sufiĉas nur sin demandi, plenkonscie kaj malmensoge: ĉu oni sukcesas dormi sen konsciencriproĉaj premsonĝoj sekve de tio kion oni faris aŭ... ne faris?

La homo estas libervola, rajtas elekti la rektan aŭ la deflankiĝantan vojon, la justan aŭ la maljustan, la bonan aŭ la malbonan... Ne ĉiam facile troveblas la ĝusta direkto, plie la devojigaj tentoj pluras... ‘Kio ne plaĉas al vi, tion ne faru al la alia’ estas tre simpla regulo, kiun ĉia filozofia aŭ religia doktrino sugestas. Ĉu eble en tio kuŝas la solvo de ĉiaj interhomaj malamoj, malpacoj, malŝatoj? De tiu senhalta ruinado de la Naturo kiu fine estas la fonto de onia vivo? Kiu scias?!? Nuntempe ŝajnas esti forgesataj la etikaj fundamentoj, la latina diraĵo *homo homini lupus (*Lupo estas la homo al la homo) fariĝas pli ol iam ajn tre aktuala.

Mi ne deziras per ĉi amara “filozofiumado” —- certe taksota nura banalaĵo elcerbumita post maldorma nokto —- malserenigi la karan legantaron, kiu ja kun ega pacienco eltenas, dum la tuta jaro, mian Bultenredaktan vortumadon: ne estis tia la intenco - mi estis nur pripensinta pri la malagrablaĵoj okazintaj pasintjare, kiuj ankoraŭ nun estas tro pezaj por ilin rapide digesti.

Plie en ĉi semajnoj mi estas leganta tre emocian kaj inspirigan libron: “La vivo de Lidia Zamenhof Filino de Esperanto”, verkita de Wendy Heller kaj elangligita de Bernhard Westerhoff. La priskribo de tiu eminenta sed altgrade sincere modesta, eĉ humila, malegoisma figuro estas bazita sur reala dokumentaro kaj precipe sur la multaj korespondaĵoj adresitaj de/al multaj esperantistoj kaj bahaanoj kun kiuj ŝi sentis sin ligita per fortaj am-sentoj. Ŝiaj historio kaj sinteno al la homoj kaj al la vivo multe min impresis. En ŝi klare oni retrovas la karakteron de la patro, kiu dolore suferis pro la malamo kaj malamikeco ekzistanta inter la homoj, kio instigis lin revi pri la rompo de la “interpopolaj muroj”, ĉar nur havante “la eblon libere interkonatiĝi kaj komunikiĝi sur neŭtrala fundamento ... povos malaperi tiaj bestiaĵoj kiujn ni nun vidas en diversaj lokoj...” (*el la malferma parolado de L.L. Zamenhof dum la 2a UK en Ĝenevo*).

Ŝi estis tre sentema, malpostulema, adaptiĝema al ĉiaj cirkonstancoj, tolerema kaj profunde konvinkita pri sia kvazaŭ heredita “sankta devo” daŭrigi la patran taskon, la disvastigon de Esperanto. En ĉ. 1925, ŝi renkontis la Bahaan kredon, kiu iom post iom altiris ŝin kaj al kiu, pli poste, ŝi sindediĉis tutenergie. Tiu virino, aspekte malforta sed kun volo firma, havis post tio kiel nurajn celojn propagandi kaj instrui Esperanton Cseh-metode por pli kaj pli altigi la nombron de la esperantistoj kaj samtempe proponi Bahaismon cele pli pacan mondon.

Vere streĉe ŝi laboradis por ambaŭ siaj konvinkoj, ĝis elĉerpiĝo eĉ, tamen neniam, malgraŭ pluraj malfacilaĵoj kaj malhelpoj, ŝi ekpensis forlasi siajn plej grandajn vivoidealojn. Dum sia tuta vivo, eĉ kiam la realo krude kaj kruele prezentiĝis antaŭ ŝi, “ŝi kroĉiĝis je la espero ke per justeco kaj edukado eblos la korojn ŝanĝi kaj ke paco povos efektiviĝi kaj ne nur resti revo” (el la *Vivo de Lidia Zamenhof*). En 1938, kiam Eŭropo jam estis ĉerande de la milit-abismo, Lidia skribis: “La kutimaj malfacilaĵoj kaj suferoj de nia ĉiutaga vivo estas hodiaŭ dekobligitaj per la cirkonstancoj de la senekzempla tempo, en kiu ni vivas.” Nenio nova sub la ĉielo: historio ripetiĝas, sufiĉas rigardi ĉirkaŭe aŭ malfermi tagĵurnalon por konstati ke la homoj estas konstante intermilitantaj. Kaj ne nur en la interbatalantaj landoj, kie oni atakas unu la alian pro religiaj aŭ etnaj kialoj, malantaŭ kio ofte kaŝiĝas la plej barbaraj el la motivoj: senbrida ambicio al grandpoveco kaj ekonomiaj avantaĝoj. Dum legado aŭ aŭskultado de raportaĵo, ŝajnas ke temas pri militbulteno, ĉar ĉiu vojo sur la tero aperas superŝutata per plej teruraj murdoj, korupteco, ŝtelado, ĉiaspecaj trompaĵoj kaj malvirtoj...

Sed la mesaĝo kiun oni povas ricevi el tiu libro, kies vortoj enkorpigas la eminentan personecon de Lidia, estas ke oni neniam perdu esperon, nek fidon en la homoj; ke la mondo sukcesos eliĝi el la infera abismo de l’ Malbono kaj ke iam “la bela sonĝo de l’homaro / por eterna ben’ efektiviĝos.”

Ni esperu, fidu je la bona flanko de la homaro, ĉar nur tiel farante kaj, niaflanke, mem agante “ni paŝo post paŝo, post longa laboro, atingos la celon en gloro”, kaj ne nur en la Esperanto-kampo!

Denove Bonan Novan Jaron de via Elda

# Laste trovitaj!



Zamenhof kaj Pujulà

Ĉu eble iu scias, kio estas, aŭ pli bone estis, la "Floraj Ludoj"? Ne, ne temas pri ludado perflo-ra, sed pri ege grava beletra konkurso iniciatinta en 1908, do antaŭ pli ol 100 jaroj, de la kataluna esperantisto Frederic Pujulà i Vallès, kies vivohistorio estas ege interesa kaj eventori-ĉa. La Floraj Ludoj fontas el mezepoka okcitana tradicio en 1323. Ekde 1393 ĝis la fino de la 15a jc tiu beletra festo estis importita en Katalu-nion, en Barcelonon. Nur dum la 19a jc ĝin oni re-starigis kiel simbolon de retroviĝo kun la klasikeco de la kataluna lingvo. En 1909, lige kun la 5[a] Bar-celona UK, la kataluna esperantistaro internaciigis tiun tradicion. Poste estis paŭzo pro la 1[a] mondmi-lito kaj alia paŭzo okazis inter 1928 kaj 1933. Sed denove tiu evento estis haltigita dum la civila milito (1936). Post disfalo de la *Franco*-reĝimo, la Katalu-na E-Asocio relanĉis en 1978 la konkurson, en kiu pli poste kunlaboris LF-koop. Definitive ĝi ĉesis okazi de post 1993 kaj la Floraj Ludoj en la katalu-na transformiĝis en simplan festivalon de poezio.




Sed ni revenu al la jaro 1909[a]. Imponis la UK en Barcelono, pro sia densa programaro kaj interveno de gravaj aŭtoritatuloj. Inter alie "Lia Majesto la Reĝo de Hispanujo nomis nian Majstron, D[on] Za-menhof, Komandoro de Elizabeto la Katolika". El 42 plej eminentaj esper-antistoj tiutempaj kon-sistis la juĝantaro, kies prezidantoj estis Rektoro Boirac, Sro Grabowski (pri poezia fako) kaj Dro Bein (pri la proza). Ili ha-vis la malfacilan taskon prijuĝi la verkojn partopre-nintajn la konkurson. La organiza komitato, konsist-anta el Carlo Bourlet (prezidanto), Dro René Arti-gues (sekretario) kaj Barono de Ménil (asesoro) akceptis nur la senpartiajn decidojn de la juĝintaro. Ĉirkaŭ kvardek estis la konkursoj, kies temoj plej variis - ĉu prozaj, ĉu poeziaj -, kiel ekzemple: *Lev-iĝanta suno kaj Verda Stelo* (premio de Japana E-sperantisto), gajninto Clarence Bicknell el Bordi-ghera; *Monografio pri Hispana Pentristo* (premio de la gereĝoj de Hispanujo), gajninto Gabriel Chavet, el Parizo; *Esperanto, kiel Simbolo de Paco kaj Amo*, (premio de esperantista grupo de Gracia), gajninto Fino L. Boistel, el Levallois-Perret (Fr); *Regno de Homoj* (premio de dro L. L. Zamenhof), gajninto Paul de Lengyel (hungaro), el Parizo; kaj multaj aliaj. Reĝino de la konkurso, ricevinta la unuan premion por poezio pri la temo "Amo", estis aklame deklarita iu germana esperantistino. Jen kiel disvol-viĝis tiu grava momento: La proklamado de la kon-kursaj rezultoj estis okazinta en la vasta gotika ha-lo de la Barcelona Borso, kie posttagmeze la esper-antistaro amasiĝis, antaŭ la enveno de la tuta urb-estraro, la prezidanto de la kataluna deputitaro, D-ro Zamenhof, la Akademio kaj la juĝintaro. La urbestro oficiale anoncis: "Gesinjoroj, la Festo komenc-iĝas!". Solene Dro Artigues konigis la nomon de la gajn-into: S-ino Marie Hankel. Tondra aplaŭdado substrekis la emocian momenton. "La simbolo de l'amo" estis la titolo de ŝia poeziaĵo.



Valoras do, legi tiujn rimaĵ-ojn, danke al kiuj ŝi famiĝis en la mondo kiel la unua Esperanto-poetino.

Rozujo sovaĝa, simbolo de l' amo,
En vintro vi staras sen ia ornamo!
En kampo vi nuda ĉagrenas dezerte,
Rozujo, malvarmo mortigos vin certe.
Mallaŭte tre dolĉa voĉeto elsonas:
„Silentu, silentu, mi dormon bezonas,
Min nutras denove patrino la tero.
Trankvile atendas mi ĝis la somero."
Dormantan rozujon printempo vekigis,
Somero ĝin riĉe kaj bele florigis.
Ho, donu al mi nun kroneton belfloran,
Girlandan, balancan kaj brile koloran!
„Ne tuŝu, ne ŝiru floraron, la mian.
Mi pikos, mi vundos la manon, la vian,
Pro amo mi miajn floretojn defendos,
Pro amo mi miajn pikilojn forsendos."
Al vento ĝi florofoliojn oferis,
Aŭtune la fruktoj fiere aperis:
Rozujo, simbolo de l' amo vi estas,
Trankvila, alloga, kuraĝa vi estas.

Certe en tiuj tempoj similaj aranĝoj estis tre alte taksitaj kaj samtempe plivalorigitaj. Sed precipa kialo estis, ke tiam Esperanto estis ankoraŭ tre ju-na kaj tial la apero de originalaj verkaĵoj havis apartajn signifon kaj gravecon ĉefe por la propa-ganda agado kaj favore al diskonigo de la interna-cia lingvo.

Indas mencii, ke ankaŭ la triesta esperantisto Artu-ro Ghez estis premiita, eĉ dufoje: unue, okaze de la 10[aj] Internaciaj Floraj Ludoj (1924), pro la unu-akta teatraĵo "Vi sola, Esperanto, povas fari tiajn miraklojn" kaj due, 12[aj] Int.F.L. (1926), pro alia teatraĵeto: "Fraŭlinoj, imitu min!". Pri ĉi lasta pre-mio, en TEA troviĝas kopio pri lia dankletero adres-ita al la organizantaro de la Ludoj pro la monpre-mio ricevita.

Kiel antaŭe dirite, la Internaciaj Floraj Ludoj ne plu okazas, de post 1993, sed jam en 1948 bonŝance UEA decidis lanĉi literaturan konkurson kadre de la Universalaj Kongresoj, kun celo evoluigi la E-kul-turon en kaj pere de Esperanto. Ekde 1953 la aran-ĝo estis nomita "Belartaj Konkursoj de UEA". Inter la gajnintoj de la Konkursoj troviĝas, ekde tiam ĝis nun, eminentaj bone konataj esperantistoj kiuj tre-ege kontribuis al pliriĉigo de la esperanta literaturo precipe en la branĉoj Poezio kaj Prozo.

Tiu ĉi prestiĝa Konkurso ege gravas por la Esperant-ista movado, kaj esperebIas, ke pro ĝi pli kaj pli da talentuloj proponu verkojn valorajn kaj vere origi-nalajn, por la antaŭeniro de nia kulturo.

*Fontoj: EdE; Vikipedio; malnovaj revuoj de TEA-arkivo*

# PLIOFTAJ PARONIMOJ

"Nia amiko VIGLO sendis plian vortvicon. Ĉu li laŭpece laboras? Kiu lin salajras?"

*La supran frazon skribis Viglo, mokŝercante pri si mem. Tia li estis: ŝercema, ironia, scivolema, ... Vigla!!*

***Tribuno*** ① *(Ar)* alta elstara podio
② *(Ar)* rezervita galerio

***Tribunuso*** ① *(Fz)* roma oficisto elektita de la ple-bo
② *(Am)* alta oficiro

***Trito*** ① *(Be)* (evi) = **Tercio**
② *(Zo)* (evi) = **Trituro**

***Tritio*** *(Ke)* radioaktiva izotopo de hidrogeno

***Tritono*** ① *(Ke)* atomkerno de **Tritio**
② Unu el tiuj mar-dioj prezentataj kiel homoj kun fiŝvosto...

***Trituro*** *(Zo)* G. (*Triturus*) de amfibioj el urode-loj

***Trokeo*** *(Be)* versero, konsistanta el unu longa kaj unu mallonga silaboj

***Trokleo*** ① *(Md)* pulioforma artiksurfaco
② *(Md)* fibrokartilaga ringo ĉe okulo

***Trolo*** ① *(Mr)* poŝforma fiŝreto trenata de ŝipo
② *(Mi)* mita supernatura estaĵo, en Skandinavio

***Troleo*** *(Te)* kurentodeprenilo de tramo ks

***Trolio*** *(Bo)* G. *(Trollius)* de herbo-plantoj el ranunkolacoj; kelkaj sp. pororname kultivataj

***Trombo*** ① *(Me)* rotacianta funelforma nubo
② *(Md)* sangokoagulaĵo en vaskulo

***Trombino*** *(Ke)* enzimo transformanta fibrogenon al fibrino

***Trombono*** *(Be)* granda latuna blovinstrumento

***Trufo*** *(Ga)* manĝebla tuberforma fruktokorpo de subteraj fungoj, simbiozantaj kun radiko de arbo aŭ arbusto

***Trulo*** ① *(Te)* trapezforma masonista spatelo
② *(Ga)* metala fritkuirilo

***Tulo*** *(Te)* retosimila travidebla teksaĵo

***Tulio*** *(Ke)* elemento, Tm; metalo

***Turbo*** ① *(Sp)* konusforma ludilo
② *(Fk)* rotacianta korpo
③ *(Te)* rapide rotacianta tranĉilo por kavigi lignon

***Turbino*** *(Te)* rotacia maŝino por produkti mo-von sub premo de akvo, vaporo, gaso

***Turpa*** malbela

***Turdo*** *(Zo)* G. *(Turdo)* de birdoj el paserfor-maj

***Turto*** *(Zo)* Specio de kolombo *(Streptopelia turtur)*

***Turno*** ĉirkaŭaksa movo

***Turneo*** *(Be)* vojaĝo de trupo tra diversaj urboj

***Tusi*** *(Me)* subite, spasme kaj brue elspiri
*(In)* intence aŭdigi similan bruon por a-tentigi iun

***Tuŝi*** ① almeti manon sur, palpi
② *(In)* koncerni

***Ulmo*** *(Bo)* G. *(Ulmus)* de arboj el ulmacoj, uzataj por ornamo, por bariloj kaj en meblofarado

***Ulno*** ① *(Md)* osto de antaŭbrako

***Unco*** *(Te)* brita mezurunuo de pezo (alilande uzata por oro k farmaciaj substancoj)

***Uncio*** *(Zo)* Sp. de rabobesto *(Panthera un-cia);* neĝleopardo

***Urano*** ① *(As)* planedo
② *(Mi)* helena dio

***Uranio*** ① *(Ke)* radioaktiva elemento, U
② *(Te)* metalo, miksaĵo de tri U-izotopoj

***Uretero*** *(Md)* ĉiu el du kanaletoj kondukantaj urinon de renoj en vezikon

***Uretro*** *(Md)* kanalo por elfluo de urino ekste-ren el veziko

***Ureuso*** *(Do)* kapvesto de egiptaj dioj k reĝoj en formo de kobro

---

Programma di apprendimento permanente — LLP — GRUNDTVIG — elloke tutmonden

## Projekto Grundtvig

## Elloke tutmonden: la novaj defioj de volontulado

La kvina trejnseminario okazis en Bjalistoko, la na-skiĝurbo de L. L. Zamenhof, de la $10^a$ ĝis la $14^a$ de decembro. Ĉeftemo estis "Kunlaborado de nereg-istaraj organizaĵoj kun la lokaj aŭtoritatoj". Tre vasta temo kiu estis tre zorge pritraktata de la loka Esperanto-grupo, kiu spertas pri tia aktivado. La Direktorino de la Centro Ludoviko Zamenhof pre-zentis la agadon de la institucio kaj ĝian helpon al la organizaĵoj en la preparado kaj realigado de pro-jektoj kaj pri kiel ricevi financan subtenon de la lokaj aŭtoritatoj. Interesa estis ankaŭ la prelego de Elzbieta Karczewska pri la kunlaborado de esperan-tistoj kun la urbaj instancoj okaze de la 94a UK en Bjalistoko. El ĉio ĉi evidentiĝis la granda atento de la urbestro al la kulturo, kiu liaopinie devas esti kiel eble plej subtenata, pro ĝia grava rolo en la eduka, evolua, civilizacia kampoj. La reprezentantoj de la ses partneraj grupoj kunsidis por priparoli pri la lastaj punktoj de la Grundtvig-programo, inter alie pri la venonta kaj lasta seminario okazonta en la urbo Vercelli (Italio) fine de marto 2015.

Intensa programo estis planita por permesi al la seminarianoj kiel eble plej varian konatiĝon kun la urbo, per irado tra ĝi laŭ la Zamenhofaj spuroj, kaj kun la Podlaĥia provinco. Tuŝante plurajn tre gra-vajn kulturcentrojn de tiu teritorio, oni kontaktiĝis kun la reprezentantoj de la ortodoksa kaj islama komunumoj, kiuj amplekse klarigis pri la historio kaj la religiaj tradicioj de la loka loĝantaro. Aparte interesa estis la vizito de Kruszyniany, vilaĝo je 6 km de la belorusa landlimo, en kiu vivas la polaj Tataroj, alkondukintaj en Podlaĥion de reĝo Johano Sobieski la $3^a$, en 1679. Plejparto de la lokanoj estas muzulmana, tial en la vilaĝo troviĝas eta, verda moskeo kaj tutapude islama tombejo.

Entute vere bonega sperto, pro kio gratulindas la elstaraj polaj organizantoj.

# Tra la mondo pluketante...

## IUKN lanĉas alarmon: 22 mil specioj riskas neniiĝon!

**La kialo?**

**La homaro troe forkonsumas natur-rimedojn**

Estas pli ol 22 miloj la specioj en la mondo riskantaj formorton. La ĉefa kialo estas la nenorma konsumado de la naturrimedoj: intensa fiŝkaptado, senarbarigado, minejaj ekspluatadoj kaj agrikulturo. Pri ĉio ĉi alarme atentigas IUKN (=Internacia Unuiĝo por Konservado de la Naturo, neregistara organizaĵo fondita en 1948, kun sidejo en Gland (Svisio), estas konsiderata la plej aŭtoritata internacia scienca institucio kiu okupiĝas pri konservado de la naturo tra la mondo. La engaĝintoj laboras en pli ol 160 landoj, arigante informojn plej aktualajn pri biodiverseco, iniciatante centojn da projektoj pri konservado de la naturo kaj donante voĉon al la naturo mem sur internacia scenejo.), kiu antaŭ nelonge ĝisdatigis sian 'ruĝan' liston pri la endanĝerigitaj specioj. En la listo, redaktita kaj aktualigita ĉijare por la $50^a$ fojo, ĉeestas bestoj kiaj la ĉina '*pilko*'-fiŝo, la ruĝa tinuso el Pacifiko, la amerika angilo kaj la ĉina kobro. Entute, en tiu listo, viciĝas 76.199 specioj, el kiuj 22.413 je risko de malapero. "Por la ruĝa tinuso el Pacifiko, klasita kiel "endanĝerigita", necesas reguloj, por ke estu precipe evitata la kaptado de la junaj fiŝoj", tiel klarigas la spertuloj. Eĉ pli riskas malaperon la ĉina '*pilko*'-fiŝo, kiu en Japanio estas uzata por *sashimi*[1)]. En la lastaj 40 jaroj malaperis la 99,99 procentoj de tiu fiŝo, do la situacio estas ekstreme kriza. Ankaŭ la ĉina kobro ne troviĝas en tro trankvila situacio: oni kalkulis, ke la kobraro malpliiĝis de 30 ĝis 50 procentoj en dudek jaroj, kaŭze de la amasa eksportado de Ĉinio al la nutraĵmerkato de Hongkongo. Jam komplete malaperis la giganta forfikulo[2)], tipa de insulo Sankta Heleno kaj la *Plectostoma sciaphilum*, heliko kiu troviĝis en Malajzio sur la ununura karsta monteto, kiu estis ekspluatita pro la ŝtonoj ĝis nuligado de la natura medio en kiu vivis tiu besteto.



1) saŝimo=maniero de la japana kuir-arto prepari kaj prezenti estetike bele fiŝojn aŭ marfruktojn).

2) El PIV = Genro *(Forficula)* de insektoj el la ordo de dermapteroj, kies abdomeno finiĝas per granda sed malforta pinĉilo.

## Ĉu ekzistas ankaŭ por la bestoj la Paradizo?

**Kion diris pri tio Papoj Francisko, Paŭlo la $6^a$ kaj Johano Paŭlo la $2^a$?**

"La Sanktaj Skriboj instruas al ni, ke la efektivigo de la mirinda plano ne povas ne koncerni ankaŭ ĉion kio nin ĉirkaŭas kaj kio eliĝis el la penso kaj el la koro de Dio". Tion ĉi asertis Papo Francisko dum ĝenerala aŭdienco, dediĉita al la vivo trans la morto. Pri ĉi tiu temo la Papo citis apostolon Paŭlo kiu "tion eksplicite asertas, kiam li diris ke 'ankaŭ la tuta kreitaro estos liberigita de la korupta sklaveco, por eniri en la gloran liberecon de ĉiuj filoj de Dio'".

**La aliaj Papoj**

"Iun tagon ni revidos niajn bestojn en la eterneco de Kristo", respondis Paŭlo la $6^a$ al infano kiu estis ploranta pro la morto de sia hundo. Kia estis lia penso, li ĝin konfirmis poste dum katekizado: "La bestoj estas la plej eta parto de la Dia kreado, sed ni iam ilin revidos en la mistero de Kristo". Ankaŭ Johano Paŭlo la $2^a$, je la $10^a$ de januaro 1990, la saman ideon tiel vortigis: "Ne nur la homo, sed ankaŭ la bestoj havas dian inspiron". Pri ĉi temo tamen Benedikto la $16^a$ reinsistis favore al la tradicia pozicio de la Eklezio, laŭ kiu "por ĉiuj aliaj kreitaĵoj, kiuj ne estas vokitaj al eterneco, morto signifas nur finon de la surtera ekzistado. En ni la peko estigas abismon kiu riskas engluti nin por ĉiam, se la Patro, kiu estas en la ĉieloj, ne etendas al ni Sian manon". Severaj la vortoj direktitaj al la bestoj sed ĉefe al la homoj: tio okazis en januaro 2008, en la *Sistina* Kapelo, ĝuste antaŭ la eksterordinara fresko "Fina Juĝo" de *Michelangelo Buonarroti*.

Mi persone ŝatas pensi, ke se io vere ekzistas en la transmondo, tie certe mi retrovos ĉiujn kiuj estis karaj al mi, ĉar se Dio estas Amo, tiu amo inkluzivas ankaŭ bestojn.

Ĉikoncerne ni memoru pri Sankta Francisko el Asizo, kies amo al Dio kaj al ĉiuj Di-kreitaĵoj estas tiel efike prezentita en "La kantiko de la kreitaĵoj", en kiu la suno, la luno kaj la tuta naturo estas laŭdataj kiel fratoj kaj fratinoj, ĉar en la tuta kreitaro reflektiĝas la bildo de la Kreinto. Francisko tre amis la bestojn kaj tiun amon oni retrovas en liaj "Floretoj", en kiuj legeblas la predikoj al la kruela lupo de Gubjo, al la sovaĝaj turtoj, al la maraj fiŝoj.

Ĉiujare en Triesto kaj ankaŭ en aliaj italaj urboj, okaze de la Festo de Sankta Francisko, la $4^{an}$ de oktobro, oni organizas tradician benadon de la bestoj. Signifoplena kutimo, ĉu ne?

**PREMIO "GIORGIO CANUTO"**

**Disertacio pri**

**INTERLINGVISTIKO kaj ESPERANTOLOGIO**

Oni anoncas por la jaroj 2014-2015 la sesan fojon la konkurson pri la plej bona doktora (trijara kaj faka) disertacio diskutita en iu itala universitato dum la lastaj tri universitataj jaroj: la premio estas dediĉita al Prof-ro Giorgio Canuto, jam Rektora Moŝto de la Universitato de Parmo (1950-1956) kaj UEA-Prezidanto (1956-1960).

Al la unua venkinto estos asignita kontribuo de € 150, kaj resumo de lia/ŝia verko estos gastigita en formo de artikolo sur la revuo *Uni-versum*. La juĝantaro tenas por si la rajton taksi pluajn verkojn indajn je publikigo, kaj trovi al ili taŭgan lokiĝon.

La juĝantaro konsistas el la Profesoroj Davide Astori, Universitato de Parmo, Prezidanto; Fabrizio Pennacchietti, Universitato de Torino; Luciano Mazzoni Benoni, Direktoro de *Uni-versum*.

La partopreno estas senpaga. Oni konkuras sendante paperan kopion de la verko al la adreso:

Associazione Esperanto "GIORGIO CANUTO"
c/o Luigia Madella Oberrauch
via Prampolini 8 – 43122 PARMA,

kaj samtempe ciferecigitan kopion al la retadreso: silkovojo@aliceposta.it ene de 15.07.2015.

Informoj riceveblas ĉe: 0521.785582.

La juĝantara taksado estas nepriapelaciebla.
La premiado okazos en oktobro 2015.




# Iom pri Filatelo...

**Elf-Arek** (Esperanto-Ligo Filatelista - Amika Rondo de Esperantaĵ-Kolektantoj) posedas ankoraŭ kelkajn individuajn poŝtmarkojn eldonitajn pasintjare en Slovenio kaj ankaŭ poŝtkartojn kun la stampo pri la $81^{a}$ Itala E-kongreso okazinta en Fai della Paganella (23.08.2013).




Ili mendeblas ĉe Elda:
Retadreso testudo.ts@gmail.com

# Filatelistoj dankas!

La preparlaboroj por la $101^{a}$ Universala Kongreso de Esperanto en la slovaka urbo Nitra komenciĝis kaj jam kondukis al du gravaj sukcesoj. La prezidanto de Slovakia Esperanta Federacio, Stano Marček, kun fiero informas, ke la prezidento de Slovakio, s-ro Andrej Kiska, akceptis la inviton de SKEF fariĝi la Alta Protektanto de la Nitra UK. S-ro Kiska estis elektita kiel ŝtatestro ĉi-jare kaj plenumas la 5-jaran oficon ekde la $15^{a}$ de junio.

Aperos ankaŭ **porokaza poŝtmarko**. La ĝenerala direktoro de la Slovaka Poŝto, inĝ. Tomáš Drucker, konfirmis tion en letero al Stano Marček, en kiu li skribis pri la intenco eldoni du poŝtmarkojn en 2016, kiam Slovakio unuafoje funkcios kiel la prezida lando de Eŭropa Unio. Jam pli frue estis decidite, ke la unua marko estos dediĉita al "ŝtat-reprezentaj aferoj", sed la dua ankoraŭ ne havis specifan temon. "Tial ni bonvenigas vian iniciaton eldoni poŝtmarkon okaze de la Universala Kongreso de Esperanto, kiu same okazos ĉe ni la unuan fojon", skribis inĝ. Drucker, aldonante, ke "per komunaj fortoj ni sukcesos videbligi nian landon ne nur en Eŭropo, sed ankaŭ en la mondo".

Gratulojn al la slovakaj amikoj kaj fruktodonan laboron! *El Gazetaraj Komunikoj de UEA*

## Ni funebras...


★ Meze de novembro 2014, Ariella Colombin, esperantistino kaj poetino, tro frue forlasis nin.

Kelkdekon da jaroj ŝi aktive partoprenis en la agado de la asocio, kies sekretariino ŝi estis en la $1980^{aj}$. Pro sia poezia verkado ŝi organizis trifoje la poezian Konkurson "Internacia Amikeco", en kiu partoprenis aŭtoroj el la tuta mondo.

Ŝi versis en la itala kaj esperanta lingvoj kaj publikigis ĉirkaŭ dekon da libroj. Unu el la plej signifaj estas "La Floroj de l' Bono" en kiu sentiĝas la anim-delikateco de la poetino: jen parto eltirita el "En viaj manoj", versaĵo tre efika kaj sentoplena.

*«Vi tenas en viaj manoj / mian blankan kalikon, / do plenigu ĝin per via forto, / ho amato. // Mi flaras parfumon / kiu venas freŝan / kiel la monta aero / el tiu viglo, / kiu vekiĝis en vi. / […] Venu, ho amato, / la horo estas pli dolĉa /apud vi.»*

★ Je la $17^{a}$ de novembro flugis al la anĝeloj Emma Fabris, la amata patrino de nia TEA-ano Federico Dal Col, naskiĝinta en Rozzo (Istrio) la $22^{an}$ de novembro 1938. Kvankam ne mem esperantistino, ŝi tre simpatiis la internacian lingvon kaj TEA-n. Ŝi restos porĉiame en la koro de la filo, de familianoj, de geamikoj kaj de ĉiuj, kiuj amis ŝin.




Estas ankoraŭ aĉetebla la libro "Triesto, inter Karsto kaj Maro - Magiaj itineroj" eldonita decembre 2013 de TEA. Tiu ĉi gvidilo prezentas Trieston laŭ la kutimaj turismaj itineroj kaj ankaŭ laŭ tiuj iom pli kaŝitaj, per kiuj vi konatiĝos kun urbo fascina kaj iom enigma. Ĝi estas tre taŭga donaco por viaj geamikoj sed ne nur: malkovru ankaŭ vi, triestanoj, vian urbon, vagante tra la paĝoj, kaj gustumu ĝiajn allogaĵojn riĉajn je plaĉaj surprizoj!

> La fakto, ke ekzistas diversaj lingvoj, estas unu el la plej grandaj misteroj de la homaro.
> *Elias Canetti - bulgara verkisto kaj eseisto 1905*-1994

## Januara Programo

| | |
|---|---|
| 9a, vendredo | 20h00 - El nia monda Literaturo |
| 13a, mardo | 17h00 - Konversacia rondo |
| 16a, vendredo | 14h40 - Esperanto en alirprogramoj Rai Uno: 5-a Grundtvig-projekto pri konstanta lernado<br>20h00 - Trafoliumante PIV-on |
| 20a, mardo | 17h00 - Konversacia rondo |
| 23a, vendredo | 20h00 - Aŭskultante niajn elsendojn |
| 27a, mardo | 17h00 - Konversacia rondo |
| 30a, vendredo | 20h00 - Vojaĝante tra Skotlando (Elda) |

## Februara Programo

| | |
|---|---|
| **1a, dimanĉo** | **10h30<br>Ĝenerala TEA-Asembleo** |
| 3a, mardo | 17h00 - Konversacia rondo |
| 6a, vendredo | 14h40 - Esperanto en alirprogramoj Rai Uno: 9 minutoj kun ...<br>20h00 - Renata Damiani, pentristino kaj skulptistino, sin prezentas |
| 10a, mardo | 17h00 - Konversacia rondo |
| 13a, vendredo | 20h00 - Renkontiĝo kun Eida Lima el Brazilo - Festo en TEA |
| 16a, lundo | 14h40 - Esperanto en alirprogramo Rai Uno: 9 minutoj kun ... |
| 17a, mardo | 17h00 - Konversacia rondo |
| 20a, vendredo | 20h00 - Trafoliumante PIV-on |
| 24a, mardo | 17h00 - Konversacia rondo |
| 27a, vendredo | 20h00 - Esperanto-filmoj |

**Bulteno de Triesta Esperanto-Asocio**
**Redaktanto**: Elda Doerfler - testudo.ts@gmail.com
**Sidejo/Poŝta adreso**: Via del Coroneo 15 - 34133 Trieste - marde 17-20; vendrede 19-21
**Tel**: (+39) 345 2490291 - 040 350093; 339 2226936
**Banka Konto**: Unicredito—IBAN IT 53 U 02008 02242 000102990439
**Reto**: esperantotrieste@yahoo.it; nored@tiscali.it
**Grupaj ttt-ejoj**: www.tea1906.altervista.org; www.karstajtagoj.altervista.org

# Ordinara Jara Asembleo de Tea

La Ĝenerala Asembleo de la membroj de TEA okazos **dimanĉon la 1an de februaro 2015 je la 10h00, unua kunvoko, kaj je la 10h30, dua kunvoko**. Ĉi lasta validos kun kiu ajn nombro da partoprenantoj.

## TAGORDO

1. Elekto de la prezidanto kaj la sekretario de la Asembleo.
2. Legado kaj aprobo de la protokolo de la antaŭa jarkunveno.
3. Raportoj pri la agado dum la jaro 2014:

    a) Morala raporto de la prezidanto *(Edvige Ackermann)*
    b) Agadraporto de la sekretario *(Elda Doerfler)*
    c) Financa kaj bilanca raporto de la kasisto *(Edvige Ackermann)*
    ĉ) Deklaracio de la revizoroj *(Amalia Zerpini - Elio Nocent)*
    d) Raporto de la triesta katedro *(Elda Doerfler)*

4. Elekto de la balot-komisiono.
5. Voĉdonado por la elekto de estraranoj kaj revizoroj.
6. Diversaĵoj (pritraktotaj dum kontrolo de la balotiloj).
7. Anonco de la rezultoj de la voĉdonado.

## DELEGILO

La asociano ______________________________________________

estas delegita anstataŭi min ĉe la Jara Asembleo de TEA, okazonta dimanĉon la 1an de februaro 2015.

Subskribo___________________________

Dato ____________________

**Notu bone!**
Okaze de la Asembleo eblos pagi al la kasisto la renovigojn de TEA-kotizo, FEI- kaj UEA-membrecoj, abonojn al diversaj ĵurnaloj kaj revuoj, aliĝon al UK ktp ktp. La sekretario peras abon-pagojn al LA GAZETO kaj membro-kotizojn de ELF-AREK (Esperanto-Ligo Filatelista—Amika Rondo de Esperantaĵ-Kolektantoj).